

La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

100-a Riverego	2	Mi estas senmona tradukisto	8
Mia dua Mekaro	3	La aprilfiŝo	9
Etosa kebekia vespero	4	Letero de Bruce Arthur al ESK	9
Lingvo ĉies, lingvo nenies 5-6		Venontaj aktivajoj	11

Nova eldono de *La Eta Princo!*

Normando Fleury

Jes ja, post plurjara elĉerpiĝo, aperos fine de la printempo 2010, la tria eldono de la mondkonata verko, *La Eta Princo* de Saint-Exupéry.

La libro unue eldoniĝis en 1961 en Francio danke al la traduko de Pierre Delaire. Poste, la Kanada Esperanto-Asocio reeldonis ĝin en 1984 en traduko funde reviziita de Delaire mem. La tria eldono postulis grandegan laboron, ĉar ne temis pri simpla reeldono, sed pri kompleta reviziado de la traduko kaj nova, multe pli kvalita, grafika prilaboro.

Normando Fleury, nome de KEA, kunordigis la laboron kaj transdonis al Francisko Lorrain la respondecon gvidi revizian teamon. Sume, ok personoj el kvin landoj detaleme atentis pri la lingva nivelo kaj fideleco de la traduko. Mi fieras pri la laborego farita, por ke la libro estu kiel eble plej perfekta.

Estis longa traktado kun Gallimard pri la kopirajtoj. Kompreneble la nova eldono entenas la originalajn bildojn de la aŭtoro, lastatempe altkvalite ciferigitajn. Tiun novan eldonon de *La Eta Princo* aperigos kune du asocioj, nome KEA kaj Esperanto-France. Bruno Flochon de EF aparte helpis, por ke la libro estu presata en Francio je favoraj kondiĉoj. Ni uzos ekologian paperon, kiu respektas la arbaron.

Se vi volas esti inter la unuaj homoj, kiuj havos la ŝancon posedi kopion de tiu valora kaj grava verko de la monda literaturo, vi povas tuj mendi ĝin de la Libroservo de KEA. Ni sendos al vi la libron kun fakturo, rapide post ricevo de stoko el Francio. La prezo estos ĉirkaŭ 25\$ kanadaj, depende de la kurzo kompare al eŭro. La sendokostoj dependas de kiom fore vi loĝas de Montrealo laŭ la kanada poŝta tarifo.

Ĝuu la legadon!

Normando Fleury

Libroservo de KEA
6358, rue de Bordeaux
Montréal, Québec, H2G 2R8
libroservo@esperanto.qc.ca

P.S. Notu, ke la Libroservo posedas nek telefonon nek faksilon.



100-a eldono de *La Riverego*!

Francisko Gauthier



Cent eldonoj por informi vin pri la vivo en nia movado, 24 jaroj da daŭra varbado de la ESKanoj por vigligi nian komunumon, monto da kvalitaj artikoloj verkitaj de niaj membroj kaj de aliaj personoj por ke ni restu informitaj kaj lertaj pri kio okazis, okazas kaj okazos en la esperantujo ĉi-tie, aliloke kaj eĉ pli malproksime!

Jes, *La Riverego* festas sian 100-an eldonon en plena gloro. Tio ne estus tiom klara se ĝia historio ne estus tiom riĉa. Ni klarigu : *La Riverego* aperis en 1986, do kelkaj jaroj post la kreiĝo de ESK. Tiam, ĝi estis tajpita kaj desegnita mane, kaj fotokopiita! Pri tio, ni devas diri ke tiam, ne ĉiuj povis munti ĵurnalon de sia propra komputilo! Kaj la juna Kebekia Societo de Esperanto ne povis pagi profesiajn servojn, kiuj estis multekostaj. Sed kun aŭdaco, tiu malgranda organizaĵo decidis eldoni sian propran bultenon. Silvano Auclair estis ĝia ĉefredaktisto de tiam ĝis 2004, do dum 18 el la 24 jaroj de ekzisto de la bulteno!

Tiam okazis granda ŝanĝo en la historio de la bulteno: en la 76-a eldono, Silvano eksplikas ke kaŭze de ĝiaj altaj kostoj, « ni ne havas la rimedojn sendi niajn eldonaĵojn al ĉiuj interesatoj pri Esperanto; ni devas limigi

nin al la pagintaj membroj ». La societo agnoskis tion kaj la sekvonta eldono estis nur por membroj de ESK. Poste, la paĝaranĝo multe pliboniĝis kun la streboj de Jérôme-Frédéric Bouchard, kaj la redaktado estis ekfarita de Jessy Lapointe. Ĝi poste pasis al Jérôme-Frédéric Bouchard, Normand Fleury kaj fine, al mi.

Mi pensas ke oni taksas la sukceson de io surbaze de ĝia evoluo. Se vi vizitas la retejon de ESK, vi havos la okazon vidi kiom *La Riverego* evoluis dum la jaroj laŭ la teknologioj, kaj vi nun povas sperti ke ĝi estas tutreta. Krome, mi havas la plezuron prezenti al vi la aspekton kiun niaj membroj elektis: akvo. Sen pripensi tion, la membroj okulsignas al la unuaj kiuj elpensis la nomo « *La Riverego* », kiu « devis iel speguli Kebekion » ĉar « Kebekio unue disvolviĝis borde kaj pere de la riverego (Sankta Laŭrenco) ». Aŭ ĉu tiu okulsigno estis tute celita?



Mia dua MEKARO

Kaj kiu scias kiam ankoraŭ pli

Ŝajo, Otavo



De la 22a ĝis la 24a de majo okazis la 10a MezKanada Renkontiĝo en Trois-Rivières, Kebekio. Ĝi estis mia unua vizito al tiu ĉi bela urbo, la kebekia ĉefurbo de la poezio.

Antaŭ unu jaro mi unuafoje partoprenis en tiu aranĝo en Toronto. Mi estis la nurunua partoprenanta E-isto de Otavo, same kiel pasintjare. Alvoje al la aranĝo kaj ankaŭ revenante mi preterpasis la urbegon Montreal kaj profitis per agrablaj vizitoj ĉe lokaj e-istoj.

Jes ja, kiel kutime ni renkontiĝis, interkonatiĝis, parolis, babilis, kaj per tiuj maleksterordinaraj agadoj pretere praktikis la lingvon. Ni ankaŭ manĝis, certe; eĉ estis malavaraj manĝoj en bonega benkado, ktp.

Estas bone rerenkonti daŭrigantajn samideanojn kaj renkonti al mi novajn; jen komencantoj kaj jen vizitintaj spertuloj kiel S-ro Gregor Hinker, prezidanto de TEJO. Plejmulte el ni estis de Kanado kaj iuj de Usono. Ĉiam agrablas al mi renkonti mallokajn homojn de nia anaro. Por mi la etoso inter ni estas kiel en festtempa jara renkontiĝo de ekster-nuklea familimembroj.

Indas mencii ke neniam mi aŭdis homojn krokodili, eĉ se la komuna lingvo de ĉiuj verŝajne estas la angla. Malgraŭ la komprenebla fakto ke iuj spertas malfacilaĵojn esprimi sin, ĉiuj sin streĉis por provi fari tion en nia celita-komuna lingvo.

Jam de la unua tago, mallonge post mia alveno, mi prelegis pri la demokratia valoro de Esperanto kaj tiu estis mia kontribuo al la renkontiĝo. Miaflanke mi deziris praktiki la propran kapablon spontane alparoli sed flanke de la aŭskultantaro mi celis vigligi ilian esperantismon kaj informi ilin diversteme pri kelkaj lingve rilataj temoj, kiel la turka reformo de la skribsistemo.

Kunkune kun la esperanta renkontiĝo, ni profitis de turisma vojaĝ-ekskurso tra lokaj vidindaĵoj : ni preteriris tra natura konservejo kaj vizitis iun centran urban monaĥinejon. La postan tagon ni vizitis malnovstilan malliberejon kaj novstilan muzeon kies ekspozicio ankaŭ temis pri krimo; vere teruraj teroroj.

Laŭ mi unu el la plej bonaj spertoj estas la librocenzo. Tiu aranĝo donas al ĉiu oportunon por libere alparoli al la rondo pri legitaj kaj legindaj libroj; mi uzis tiun okazon por alparoli pri *Marta* tradukita far Zamenhof kaj *La Ŝtona Urbo* verkita far Löwenstein.

Belegas dum varmega printempo malfrua; mi estis surprizita ke tiom norde sidante sur balkono fronte al la rivero Saint-Laurent mi sentis haŭttiklajn pikojn de la sunvarmego. Post harda kanada vintro mi multe pli

aprezas la vivdonan povon de la sunon, la naturon kaj ĝiajn vivdonajn disradiiaĵojn.

La bonfamo de nia afero ankaŭ estis publikigata tra la loĝantaro de la urbo per multaj slipoj skribitaj en esperanto, kiuj estis alkroĉitaj al ĉirkauaj monumentoj.

Mi volas ankoraŭfoje danki la lokan rondon por bone plani kaj gastigi nin kaj min en ilia bonvenema urbo. Ver-

dire dank'al tiuj renkontiĝoj mia sperto de Kanado estas pli vastriĉa.

Certe ke por la renkonto indas elspezo de la maja longa semajnfino. Do, se vi, aŭ amiko via, estas en la sama situacio, atentu mian sperton kiel nova esperantisto kiu rakontas al vi miajn freŝajn memoraĵojn pri tiu mirinda semajnfino!



Etosa kebekia vespero

Normand Fleury

La soirée québécoise fut un franc succès avec une douzaine de participants, dont deux journalistes de la radio (CIUT radio McGill/CKUT 90,3 et CIBL Radio Montréal). Après un repas communautaire avec fèves au sirop, tourtières, fromage, salade de chou, tartes au sucre et bières, les participants, originaires de sept pays (Brésil, Canada, Croatie, France, Haïti, Mexique, Pakistan) et parlant sept langues différentes, ont répondu aux questions des deux journalistes présents. Normand Fleury a présenté des CD de musique traditionnelle et la soirée s'est terminée en chansons.

Plia sukcesa Esperanto-vespero okazis en marto 2010. La temo estis Kebekio kaj la dekduo da partoprenintoj ĝuis la etoson, la komunan manĝon kaj la babiladon pri kebekia muziko. Alvenis ankaŭ du ĵurnalistoj (el CIUT radio McGill/CKUT 90,3 kaj CIBL Radio Montréal) kiuj intervjuis nin pri deveno, utilo kaj uzebleco de Esperanto. Fakte mi aldonu ke ambaŭ estis forte impresitaj aŭdante, ke eĉ komencantoj povas libere partopreni la vesperan programon nur post kelkmonata lernado. Unu ĵurnalista estante anglalingva kaj la alia, franclingvano, la intervjuoj okazis en la du lingvoj. La ĵurnalistoj ankaŭ miris pri la bunteco de la Esperantaj kulturo kaj movado. Ĉeestis la vesperon homoj el sep devenlandoj kaj same multe da lingvoj (angla, franca, kroata, haiti-kreola, portugala, hispana, penĵaba) kaj tio plene pravigis la neceson de internacia neŭtrala lingvo.

La komuna manĝo estis bongusta kun fazeoloj bakitaj kun acera siropo, vianda kaj vegetara tortoj, brasika salato kaj ruĝaj betoj, fromaĝo kaj bieroj. Fine estis acersiropa deserto kaj sukera torto.

Normando prezentis lignajn kulerojn, kiuj uzeblas por muziki, vestis sin per sag-desegna zono kaj prezentis erojn de folkloro muziko komencante per indiĝena kantado de Florent Vollant, poste La Bottine souriante, Garolou, Le Rêve du diable kaj fine Mes Aïeux. Ni kunkantis du kantojn el la Kebekia kantareto preparita de Jean-Claude Bélanger okaze de TAKE 2008.

La diversaj kebekiaj bieroj kontribuis al plia longa babilado pri diversaj temoj kaj ni aŭdiaŭis invitante la partoprenintojn aliĝi MEKARO-n, kiu okazis en Tririvero meze de majo.



Dum la kebekia vespero, fine de marto, Normando prezentis kelkajn elementojn de kebekia kulturo kiel la sagzono, ligna kulero kaj tradicia muziko.

Durant la soirée québécoise, fin mars, Normand Fleury a présenté la ceinture fléchée, les cuillères musicales en bois et la musique traditionnelle.

Lingvo ĉies, lingvo nenies

Silvano La Lacerto Auclair



L'auteur présente d'autres langues construites à vocation internationale. Cet article présente une langue se voulant radicalement neutre.

Esperanto asertas sin *neŭtrala*. Tamen, pluraj plendas, ke la multnombreco de latindevenaj kaj francdevenaj vortoj (kaj en malpli granda skalo de germandevenaj vortoj) en ĝia vortprovizo igas la lingvon multe pli facile lernebla fare de franclingvanoj kaj ĝenerale de parolantoj de Eŭropaj lingvoj. (Sekve, ni ne plendu pri malfacilaĵoj de Esperanto!) Nu, oni povas klarigi tion per la prestiĝo kaj de la franca kaj de la latina lingvoj en la fino de la deknaŭa jarcento. Sed fakto estas, ke ne ĉiuj homoj estas egalaj antaŭ Esperanto. Ni legu tian plendon, kiu plej certe aludas lingvojn kiel Esperanto:

«D'autres langues répondant à la même problématique avaient déjà été proposées. Certaines ont même connu un succès d'estime et ont suscité quelque intérêt et pratique en leur temps.»

«Cependant, l'une des raisons majeures de leur échec tient au fait, sans parler de choix "techniques" ou grammaticaux contestables, qu'elles ont été conçues comme un pidgin occidental, une sorte de néo-latin mâtiné d'influences et de vocabulaire puisé aux sources des principales langues occidentales. Ainsi, certes cela permettait de trouver un écho auprès du public européen et occidental, mais cela constituait aussi un parti pris difficile à avaliser pour des locuteurs issus d'autres cultures. En outre, selon l'adage bien connu "on préfère toujours l'original à la copie", même au sein de son public préférentiel, le succès escompté n'a finalement pas été au rendez-vous.»

Kompreneble, la aŭtoro de tiu teksto proponas sian sol-

von. Ĝi estas lingvo, kiu, kiel multaj artefaritaj lingvoj, havas regulan gramatikon, fonetikan skribon, regulan akcenton, klaran indikon de gramatikaj funkcioj per finaĵoj, eblecon regule krei plurajn vortojn el unu radikoj per afiksoj kaj kunmeto de radikoj, sed en kiu la radikoj **neniel similas al tiuj de naturaj lingvoj!** Kie Zamenhof klopodis elekti radikojn plej facile rekoneblajn almenaŭ de klera Eŭropa samtempulo, la radikoj de *Kotava* estas egale **malfacilaj** por ĉiuj!

S-ino Staren Fetcey kreis la lingvon *Kotava* en 1978. La vorto *Kotava* signifas «lingvo ĉies» (*kot*: ĉiuj; *ava*: lingvo). Nu, mi devas konfesi, ke la ĝenerala aspekto de *Kotava* aperas al mi plej fremda. Por ilustriti tion, jen ekzemplo. Klopodu rekoni tiun **famegan** tekston:

Minaf Gadik dan koe kelt til,

Rinaf yolt zo tutumtar,

Rinafa gazara pir,

Rinafa baltarina zo askir moe tawava dum koe kelt.

Ĉu vi sukcesis? Jen helpindikoj. *Min* signifas «ni», kaj *minaf*, «nia» (precize kiel en Esperanto, ĉar -(a)f estas finaĵo por adjektivoj). *Gadik* signifas «patro» aŭ «patrino»; *neniu* baza vorto indikas sekson: por viroj oni aldonu -ye, por virinoj -ya, eĉ al pronomoj!

Tiu teksto ankaŭ ebligas nin prezenti interesan econ de *Kotava*: la adjektivoj (kiel *rinaf* aŭ *rinafa*, «via») *akordiĝas* kun la substantivoj (ĉi-tie *yolt*, «nomo», aŭ *gazara*, «regno») laŭ

tio, ke ili ambaŭ finiĝas per iu konsonanto aŭ per la sama vokalo. Bone elpensita eco por igi la lingvon pli belsona.

Lingvo sen akuzativo

En *Kotava*, nur verboj havas gramatikajn finaĵojn, laŭ la sep personoj (*Kotava* distingas du *ni*: la inkluzivan, kun signifo *mi kaj vi kaj aliaj*, kaj la ekskluzivan, *mi kaj aliaj, sed ne vi*) kaj kun sufikso por pasinteco kaj estonteco. Ĉiuj aliaj funkcioj estas indikataj per prepozicio. Sekve ne estas akuzativo aŭ alia kazo. Ĉu ni ĝoju kaj iĝu ĉiuj kotavistoj? Nu, eble ne, ĉar por la «rekta» komplemento oni ankaŭ uzas devigan prepozicion: *va*. Tiel, «la pomon manĝas Paŭlo» tradukiĝas al *va pruva Paul estur*. Kiel en Esperanto, vortordo estas libera, sed la kutima ordo metas la komplementon en unuan lokon.

Sekve, estas ankaŭ neniuj finaĵoj por pluralo. Se ne estas nombro aŭ kvazaŭnombro (kiel *pluraj, ĉiuj, ktp*), oni indikas pluralon per la adjektivo *yon*. Ekzemple: *koe kelt va yon bitej wí*, «en ĉielo n j stelo mi vidas», t. e. mi vidas stelojn en la ĉielo.

Unu laŭ mi malavantaĝo — sed laŭ la kotavistoj avantaĝo — de *Kotava* estas la granda aŭ troa riĉeco de ĝia vortrezoro. Tabelvortoj estas 79 (nur 45 en Esperanto). Ekzistas pluraj dekoj da prepozicioj, kaj, krome, ĉiuj prepozicioj pri lokoj havas *kvar* formojn: kie oni estas, de kie oni venas, kien ni iras, kaj preter/apud kie oni pasas. Estas kvar tipoj da neo. Krom la sep personoj kaj la tri bazaj tempoj, verboj povas ricevi kvin statojn (pozitivan, asertan, necertan, nean kaj kontraŭan), kvar voĉojn (aktivan, pasivan, refleksivan kaj reciprokan), kvar modojn (inter kiuj NE troviĝas infinitivo), dek aspektojn (daŭran, progresan, adan, antaŭan, postan, ktp) kaj dek modalojn, kiuj preskaŭ ĉiuj plidetailiĝas

en submodalojn. Por ĉiuj oni devas lerni la signifon kaj apartan vorteton. Verboj povas esti tiel simplaj kiel *tí* (mi estas) aŭ tiel malsimplaj kiel *in al en zo co-rostayar*: «li/ŝi vere povintus esti kondukita». Kaj la vortaro fiere anoncas 17 000 radikojn (mi ne kalkulis).



La flago de Kotava. La kvin bandoj reprezentas la kvin kontinentojn; de supre malsupren: Amerikoj, Afriko, Antarktika, Oceanio kaj Eŭrazio.


Internaciaj vortoj

Laŭ mi, vera testo pri internacia lingvo estas la akcepto en ĝin de internaciaj vortoj. *Kotava* povas simple alpreni al si nomojn de lokoj kaj homoj, kun kategoriilo: *Québec winkik* estas «loĝanto de Kebekio», kaj *Łódź widav*, la «urbo Lodzo» (sed nenio klarigas kiel elparoli tiujn fremdajn vortojn). Tamen, kvankam traduki «metro»-n al *metrolk* (kun la akcento sur o!) povus esti akceptebla, se tio necesus por respekti ĝeneralan gramatikan kadron, traduki «kilometro»-n al *decitmetrolk* kaj «centimetro»-n al *decemeametrolk* (ĉar *decit* estas la radiko por «mil», kaj *decem*, por «cent») estas por mi pruvo, ke la lingvo estas malliberigita de sia gramatiko kaj netaŭga al sia celo.

Tamen, malgraŭ siaj mankoj (laŭ mi), *Kotava* allogis grupon de simpatiantoj kaj de parolantoj. Ĝia retpaĝo, www.kotava.org, estas tre bele prezentita en multaj lingvoj, Eŭropaj kaj ne (unuarange la franca, sed ankaŭ la angla, hispana, germana, itala, nederlanda, portugala, lingala kaj turka, kun elementoj en la rumana).

Mi estas senmona tradukisto

Une traduction qui ne sera pas publiée...



Stéphane Brault

Tuj kiam mi komencis lerni Esperanton, mi revis uzi la internacian lingvon por traduki el la franca rakontojn aŭ romanojn, antaŭ ĉio kiel pliboniĝa memekzerco, sed ankaŭ – kial ne? – por diskonigi al Esperantujo kelkajn el miaj ŝatataj verkistoj. Antaŭnelonge, mi finis trakuki *Je suis un écrivain japonais* de Dany Laferrière, romano pri haitidevena kebekia verkisto, kiu, admiregante la japanan poeton Baŝo, deklaras sin... japana verkisto. Leginte la verkon unuafoje, mi tuj trovis ĝin esperantiginda pro ĝia ironia vikipunkto pri la nacia identeca demando, sed ankaŭ plaĉis al mi la rolo, kiun ludis Montrealo en la romano. Mi ne estas tiel naiva por pensi, ke mia tradukaĵo tute sendifektas, tamen, kontenta pri la unuaj du ĉapitroj, mi decidis sendi ilin al franca magazino – La Kancerkliniko – cele aperigi ilin ie kaj eble ricevi komentojn poste. La magazino afable akceptis mian kontribuadon, kaj mi entuziasme strebis obteni la kopi-rajtojn de la rajthavanto – ne Boréal, kiel mi unue kredis, sed Grasset, en Francio.

Jes, post kiam Laferrière gajnis la premion Médicis por sia lasta romano, lia kvoto altiĝis: nun, ne nur grava franca eldonejo aperigas liajn librojn, sed la rajtoj por ili iĝis astronomiaj. Por la naŭ paĝoj, kiujn mi volis aperigi, Grasset postulas la bagatelaĵon je 200€! Mi timas imagi kiom kostus la tutan romanon... Mi rezignu mian projekton. La Kancerkliniko estas nur eta magazino ne profitdona, kaj mi certe ne intencas donaci tiun sumon al piratoj tiaj.

Jen bona leciono por mi kaj aliaj tradukantoj: oni ĉiam elektu verkistojn mortajn de almenaŭ 50 jaroj (70 jaroj en Eŭropo); iliaj verkoj nun estas publikaj kaj senkostaj. Intertempe, mi devas enŝranki mian tradukaĵon. Kia esperanta eldonejo interesiĝus pri romano kies rajtoj tiel multekostas? Ve, jen ekzemplo pri kiel kultura industrio malhelpas kulturan disvastigon kaj interkompreniĝon.



La aprilfiŝo

Legis Minjo Renaud, kuntradukis ŝi kaj Francisko Lorrain.

La aprilfiŝo estus franca inventaĵo el la jaro 1564. Tiam la reĝo Karolo la 9a decidis fari historie gravan decidon: la jaro ekde tiam komenciĝos je la unua de januaro anstataŭ la unua de aprilo.

Por inciteti la homojn malbonhumorigitajn de tiu ŝanĝo oni faris al ili, je la unua de aprilo, ŝajnajn jarkomencajn donacojn, kiuj poste degeneris en ĉiaspecajn ŝercojn aŭ blagojn. Tiujn ŝercojn oni nomis "aprilfiŝoj".

Cetere la monato aprilo estas kaj tiu, en kiu la suno ĵus eliris la zodiakan signon de Fiŝoj (de la 19a de februaro ĝis la 20a de marto), kaj tiu, en kiu komenciĝas la fiŝkaptada sezono.

Fonto: Yvon Desautels, *Les coutumes de nos ancêtres*, Montrealo, Éditions Paulines, 1984.

Letero de Bruce Arthur al ESK

La rédaction a reçu une lettre de Bruce Arthur, Régina, Saskatchewan. Il explique qu'il est membre de la SQE depuis près de 20 ans. Il aime La Riverego format papier, puisqu'il n'a pas d'ordinateur (NDLR : Seulement 3 de nos membres sont dans cette situation) et dit aimer également le contenu en français, qui lui permet de pratiquer cette langue qu'il a apprise il y a longtemps. Il est moins actif maintenant, mais se dit prêt à aider le mouvement espérantophone.

Estimataj Francisko Gauthier kaj aliaj,

Dankon por *La Riverego*, kiun mi ricevis poŝte. Mi surpriziĝis ĉar mi ne antaŭvidis ricevi ĝin. Mi unue aliĝis al ESK antaŭ preskaŭ dudek jaroj. Vi eble demandas, kial Saskaĉevanano aliĝis al via kebekia societo? Nu, kiam mi unue komencis lerni Esperanton, mi decidis skribi leteron al la Kanada Esperanto-Asocio. Mi ie trovie ties adreson, laŭ tio, la adreso estis en Montrealo. Efektive, la adreso estis iom malnova. Sed mia letero alvenis ĉe Nor-

mand Fleury kiu afable respondis ke la nova adreso de KEA estis ĉe Sidney, Brita Kolumbio. Sed li ankaŭ sendis ekzemplerojn de *La Riverego* kaj de la katalogo de la Libroservo de KEA. Mi sekve skribis al KEA por aliĝi, sed mi ankaŭ decidis aliĝi al ESK por plu ricevi *La Riveregon*. Mi pli poste deĵoris kiel estrarano de KEA dum kelkaj jaroj. Mi kelkfoje verkis artikolojn por kaj Lumo kaj *La Riverego*. Mi ĉiam pensis, ke indas aliĝi al ESK ĉar *La Riverego* aperas pli regule kaj pli ofte ol Lumo (aŭ Alumeto) kvankam la kotizo de ESK estas malpli granda ol tiu de KEA. *La Riverego* parte uzis la francan lingvon sed tio ne ĉagrenis min. Male, mi ĝuis povi ekzerci legi tiun lingvon. Mi studis la francan dum pluraj jaroj (koste al la impost-pagantoj), kaj pro tio mi povas pli-malpli legi ĝin, kvankam mi apenaŭ povas paroli ĝin. Mi ĝuas legi la francan de tempo al tempo por ne forgesi ĝin kaj eble eĉ por lerni iom plu.

Mi malpli aktivas pri Esperanto ol en antaŭaj jaroj, sed la afero ankoraŭ interesas min. Mi ankoraŭ pretas helpi la movadon se iu havas ideon, kiel mi povus fari tion. Mi ankoraŭ aliĝas al KEA, kaj mi intencas aĉeti ion de la Libroservo ĉiujare. Sed kiam mi legis ke ESK ŝanĝiĝas kaj ke vi estos tute reta asocio, mi decidis forlasi la asocion. Mi tute ne plendas pri la ŝanĝiĝo. Mi esperas ke tio donos al vi pli grandajn sukcesojn. Sed mi decidis uzi tiun monon por aĉeti ion de la Libroservo. Mi rigardos la ret-katalogon de la Libroservo per komputilo de libropruntejo aŭ de familiano. Sed mi malmulte uzas komputilojn. Mi ĝis nun ne aĉetis komputilon. Mi ŝajne pensas malsame ol aliaj homoj, sed mi pensas ke komputilo ne donas sufiĉajn avantaĝojn por indigi la elspezojn por komputilo, kiu ankaŭ postulus de mi multan tempon kaj energion. Sed mi ankaŭ pensas ke oni povus ŝpari monon kaj tempon se oni uzus Esperanton kiel internacia komunikilo kaj plimultaj homoj pensas ke tiu ideo estas freneza!

Mi kunsendas malgrandan donacon por helpi la bonan laboron de via societo.

Salutas amike kaj samideane, Bruce



Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

<i>Tago</i>	<i>Dato</i>	<i>Horo</i>	<i>Loko</i>	<i>Ĉe la menuo..</i>
Vendredo	24-a de septembro 2010	18 h	Commensal	Jarkunsido de ESK
Vendredo	29-a de oktobro 2010	19 h 30	MEDO	Babilado pri infanrakontoj
Vendredo	26-a de novembro 2010	18 h	MEDO	Ĉina komuna vespermanĝo
Sabato	11-a de decembro 2010	18 h	Commensal	151-a datreveno de L.L. Zamenhof

La manĝoj en MEDO estas bona ebleco gustumi ion novan. Se vi planas veni, ni petas ke vi pretigu aŭ aĉetu ion laŭ la vespera temo. Necesas anonci vian alvenon kelkajn tagojn antaŭe, se vi volas partopreni: info@esperanto.qc.ca.

Samtempe informu nin pri tio, kion vi planas kunporti. Vi povas ankaŭ alporti tipan trinkajon. Atentu ke temas pri bufedeca manĝo. Eblos varmigi manĝojn forne aŭ

mikroondforne. Pensu ankaŭ pretigi ion pri la temo por la vespera babilado. Kompreneble se vi ne deziras kunmanĝi, vi estas bonvena je 19 h 30.

Si vous désirez participer aux repas communautaires thématiques, vous devez apporter un mets. Vous devez également confirmer votre présence quelques jours avant, en mentionnant le nom du plat. Si vous ne désirez pas participer au repas, vous êtes le bienvenu à partir de 19 h 30.

Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

9-11 ^a de oktobro 2010	17 ^a ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono
21-23 ^a majo 2011	8 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kingston, Ontario
19-21 ^a majo 2012	9 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio



Esperanto-Societo Kebekia
Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro: marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafikoj: Francis Gauthier (riverego@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK: Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Pierre Pouliot-Lavoie (kasisto), Martin Benoît (konsilanto).

Limdato por la venonta eldono / Échéance
pour le prochain numéro: 2010.08.20

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme: Francis Gauthier (riverego@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE: Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire), Pierre Pouliot-Lavoie (trésorier), Martin Benoît (conseiller).

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8
info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à:
riverego@esperanto.qc.ca

Montreala Esperanto-Domo (MEDO)
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

(Vidu retejon por vidi kiel atingi)
(Voir site web pour un plan d'accès)

Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo
Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement

Service de librairie postale à Montréal
La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.

Service de librairie postale à Montréal
Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.

www.esperanto.qc.ca/katalogo